# CONCORDE

## NICA STELO

NICE - ESPERANTO - COTE D'AZUR

Abonprezo : 2 F 3
Subtenabono : 5 F

Organe Culturel

*Direktoro :*
**Hubert FEREZ**
7, Avenue de Reims
NICE (Francujo)

**C. C. Postal TOULOUSE 632.15**

**TRIMESTRIEL**

**N° 15**

**Novembro 1967**





RENKONTIĜO en CANNES. En mezo, nigre vestita, Sro GARINO
Vicurbestro de C A N N E S

------------


"CONCORDE" - Inscrit à la Commission Paritaire des Papiers de Presse sous le numéro 38.390.

★

Le Gérant : Hubert FEREZ

# HOMMAGE A ZAMENHOF

Il y a cinquante ans, mourait à Varsovie
Le Docteur Zamenhof, qui consacra sa vie
A servir l'idéal qu'il s'était proposé
Et, qu'en dépit de tout, il a réalisé.

Car ce qu'il désirait, c'est que sur notre terre
Il n'y ait plus jamais de sang versé, de guerre,
Il rêvait d'un bonheur où tout le genre humain
Vivrait enfin paisible, en se tendant la main.

Mais, pour que puisse un jour s'accomplir ce miracle,
Il fallait avant tout remédier à l'obstacle
Des langues, c'est pourquoi Zamenhof entreprit
La création de son "Esperanto", au prix

De longs et patients efforts. La réussite
Vint enfin couronner son prodigieux mérite
Au Congrès de Boulogne, où il fût à l'honneur
Puisqu'il reçut la Croix de la Légion d'Honneur.

Dès lors, l'Esperanto se répand dans le monde :
Son "étoile" grandit, cette langue seconde
Réunit tous les ans des milliers d'adhérents
Enthousiastes, venus de pays différents

Et se comprenant tous, grâce à cette merveille
Ce langage d'amour sonnant bien à l'oreille,
Le Maitre Zamenhof en est réconforté,
Il approche du but ardemment souhaité...

Jusqu'au funeste jour où éclata le drame
De mil neuf cent quatorze ; alors, la mort dans l'âme,
L'apôtre de la paix, de la fraternité,
Voit encor son beau rêve rejeté.

Il meurt trois ans plus tard, mais son oeuvre demeure :
L'Esperanto progresse et je crois qu'à cette heure
Les plus beaux, les plus grands espoirs nous sont permis;
Tous les hommes bien nés deviendront ses amis.

Honneur à Zamenhof ! Bénissons sa mémoire !
Bientôt l'humanité proclamera sa gloire
En le reconnaissant comme son bienfaiteur,
Puisqu'il lui a donné son génie... et son coeur.

Juillet 1967

Léa ESPITALIER

## LA VIVO DE LA GRUPOJ

AIX-EN-PROVENCE - Kunveno de la Grupo : ĉiumerkrede. En la nuna periodo, ĉiusemajne, en alia loko, sub la direktado de nia senlace sindonema Prezidanto de l'Federacio Marcel JULLIEN, kunvenas tiuj, kiuj okupiĝas pri la organizado de nia 60a Nacia Kongresso. En la proksima numero de "Franca Esperantisto" aperos la definitiva programo de la Kongreso . Tiu kongreso okazos la 12an - 13an - 14an kaj 15an de aprilo 1968. Kongresejo : malnova beletra Fakultato (strato Gaston de Saporta). La 12an posttagmeze, oni akceptos tiujn, kiuj jam alvenos. Sabaton matene okazos la ekzamenoj : Atesto pri lernando, supera lernado, kapableco, pedagogia. La 16an okazos tuttaga postkongresa ekskurso en Camargue.

Intensa propagando de Prezidanto Marcel JULLIEN - Nia Prezidanto JULLIEN, krom liaj klopodoj por preparo de la Kongreso, pliampleksigis la informagadon farante paroladojn en kiel eble plej da lernejoj kaj aliaj lokoj. Ekster AIX, li faris paroladon en la liceo de SALON, kie tuj malfermiĝos kurso kun 15 lernantoj gvidota de revarbita esperantisto Sro BUCCIARELLI, vicklegiestro. Li faris same en la kultura Junuldomo de VITROLLES, kie jam funkcias kurso kun 13 lernantoj gvidata de entuziasma nova samideano, Sro DEYROLLES.
En AIX, Marcel JULLIEN vizitis multe da lernejoj, sed la tiea agado estas pli kaj pli malfacila pro la tro streĉa tempokupo de la lernantoj. Li gvidas kurson en la Liceo kun kvin lernantoj kaj en la Oficirprepara lernejo kun kvar lernantoj. En la porinstruistina seminario, li gvidas kurson de 23 lernantinoj. Li prelegis en la Altlernejo de Artoj kaj Metioj antaŭ 100 lernantoj. Multaj interesiĝis sed ne havas tempon nun por lerni Esperanton. Li estas prelegonta ankaŭ en 4 aliaj lernejoj...
En la nuna jaro Aix havis bonŝancon ke enposteniĝis en la Fakultato de Aix Samideano DUC GONONAZ kiu, kun la jam ekzistanta grupo de esperantistaj studentoj, esperas povi gvidi kurson de Esperanto ĉe la Beletra Fakultato.

AVIGNON - Agado pli individua ol grupa. Sino Simone HUMM, gastigis eksterlandanojn, inter kiuj Gesj SCHWERIN el Australio kaj Finon S. GOTOO el Japanio. Nune, Sino HUMM kun Sro MOTTO el Bésiers aktive preparas la internacian Kongreson de la Esp. Fervojistoj, kiu okazos en 1969 en AVIGNON.

CANNES - La 23an de Julio, sub la oficiala kaj efektiva Prezidanteco de Sro GARINO Vic-urbestro de Cannes, okazis en "Palais des Festivals"solena disdono de diplomoj kaj premioj al la laŭreatoj de la Esp.kursoj. Per tute samideaneca parolado. Sro Garino faris historion de nia movado en Cannes memoriginte pri la du grandaj pioniroj, animintoj de nia agado : Sro BOYER kaj Sro TRIOU. Li substrekis la rimarkindajn sukcesojn de la kursoj de Sro LANZO, delegito du "Comité CONCORDE".
H. FEREZ, en ĉies nomo, dankis la Urbestron kaj la organizintojn de la manifestacio Kaj, alparolinte Sron GARINO, al li diris : "Votre haute culture littéraire, votre vaste connaissance de tous les problèmes culturels et sociaux que pose l'administration d'une ville telle que Cannes, confèrent à votre très précieux appui plus que la valeur d'un symbole, mais une véritable consécration de l'oeuvre culturelle à laquelle nous nous consacrons sans relâche. "Kaj, parolinte pri la disdono de la premioj, li aldonis : "Je souhaite que cette distribution des prix soit l'augure d'un mouvement culturel d'un niveau intellectuel croissant et d'un dévouement sans bornes à notre si belle cause".

Post fotografo antaŭ la palaco (vidu foton sur la unua paĝo), ĉiuj partoprenintoj,, kun flagoj kaj florfasko iris al la strato Zamenhof kie okasis kortuŝa manifestacio de dankemo. Sro TRIOU, per emocie elokventaj paroloj elvokis la fastan tagon de l'bapto de la strato Zamenhof kies iniciatinto li estis. Fino Léa ESPITALIER, verve kaj talente deklamis la kortuŝan poemon "Hommage à Zamenhof" kiun ŝi verkis por la cirkonstanco.

Ce la bankedo kiu sekvis kantis Sino Fernande CAVELAN, kun sia kutima ĉarmo kaj Fino Paulette LAMBERT, Professeur au Conservatoire, regalis la aŭskultantaron per arte luditaj violonarioj Sro Alexandre LAMACCIA interpretis en Esperanto la faman italan kanzonon "Mama" tradukitan de Sro Louis VANNINI ... Du ĝojigaj surprizoj donis al tiu Renkontiĝo internacian karakteron : la ĉeesto de juna Japana studentino, kiu ankaŭ kantis kaj la partopreno de Gesinjoroj HESSE, el BUENOS-AIRES, (Sro Hesse estas Delegito de U.E.A. en tiu urbo) kiuj parolis pri sia lando kaj pri la Esperantista solidareco. Ni rimarkigas ke tiuj bonaj kamaradoj venis el Marseille akompanitaj de gesinjoroj LEONI, tre konataj sindonemaj gesamideanoj en Marseille. Multajn dankojn al ili, kiuj invitis Gesinj. HESSE partopreni nian manifestacion.

El la multanombraj ĉeestintoj ni citu : Fino COMMINO, Sino BARITEAUD, Sro DERKS, Sro VANNINI, Sro FROEHLICH, Sro PAZZINI, Sro FONTANA, kaj Sro GILLES. Oni disiĝis kantante la Renkontiĝkanton "Himmo al Paco".

La kurso jam rekomencis en Cannes, en tute 3 kursoj kies profesoroj estas : Fino Paulette LAMBERT, la distingita Profesoro de l'Conservatoire de Musique, kun 8 lernantoj kaj Sro FOUSSARD, kun 3 lernantoj. Sro LANZO kun 6 lernantoj

<u>G A P.</u>- Nia aŭtuna agado ankoraŭ ne rekomenciĝis. La 17an de oktobro ni faris paroladeton antaŭ 20 gejunuloj en "Foyer des Jeunes", sed ĝis nun ne konas la sekvon de tiu klopodo. Nia publika kurso malfermiĝos la 26an de oktobro kaj okazos du vesperojn ĉiusemajne.

Ni adresis peton al la Direktorino de la porknabina liceo por restarigo de la kurso kiel la antaŭajn jarojn sed ĝis nun ne ricevis respondon. Nian planon eldoni afiŝojn sur lumestra papero ni lasas en dormeto ĉar ĝis nun neniu grupo jese respondis al nia peto; tamen ni povos ĝin repreni se almenaŭ 6 grupoj konsentas mendi po 50 afiŝetoj je la kosto : 95 f. Roger COLNEY.

<u>GRASSE</u> : La 15an de oktobro, en salonego de la urba teatro, okasis la disdono de la diplomoj kaj premioj al 16 laŭreatoj de Grasse kaj Mougins. La ceremonion prezidis Alfred GIRAUD, Vicurbestro. Dank'al Sino RAGON, kiu senavare donacis al la grupo flagojn el multaj nacioj (komprenable ankaŭ el ... Esperantujo !) la kunvenejo estis vere laŭ tutmonda skalo bele ornamita ! La animantino de la movado en Grasse, Sam. Pauline BARITEAUD, malfermis la kunvenon. Hubert FEREZ dankis ĉiujn ĉeestantojn kaj reliefigis la solidarecon kiu pli kaj pli unuigas la esperantistojn el nia regiono ; ĉeestis ja delegitoj el 6 urboj : Dro CORYNEN kaj Sinjorino KLEIN kaj Sinjorino, kaj Sro Louis VANNINI el Monaco - Fino Léa ESPITALIER, el Vallauris - Fino COMINO, Fino SAURIN, Sro CAVELAN kaj Sinjorino, Sro POMEROL, Sro FROEHLICH, Sro PAZZINI kaj Sro LAMACCIA el Nice - Sro BERTHIER kaj Sinjorino el Antibes - Sro ROFO kaj Sinjorino el Juan-les-Pins - Fino Paulette LAMBERT, Sro GILLES, kaj Sro FONTANA el CANNES.

Per minuto da silento, la ĉeestantaro dankeme omaĝis al memoro de Ernest RAGON, pioniro de Esperanto en Grasse.

Poste, la rimarkinde sindonema Direktoro de la kursoj, Sro LANZO, komencis la disdonon de la diplomoj kaj premioj.

Sekvis distra parto : kun sia kutima sentoplena, kortuŝa dirmaniero, Fino ESTIPALIER recitis sian ĉefverkan poemon "Hommage à Zamenhof" ; Sino KLEIN kaj Fernande CAVELAN ĉarmis la aŭskultanraron per siaj ĉarmplenaj kantoj. Granda estis tiam la surprizo kiam per sia emociiga, vibranta voĉo, Dro Henri CORYNEN interpretis unun el la plej ravaj arioj de "La Traviata"!

Poste okazis ekskurso bonege organizita de Pauline BARITEAUD al la Grotoj de Saint-Cezaire antaŭ kiuj, sub ombro de arĝentaj olivarboj, oni ĝoje piknikis aŭskultinte la de Dro CORYNEN virtuoze luditajn violonariojn kaj la impetajn kantojn de Sro LAMACCIA.

Gratulon al Sino Pauline BARITEAUD kaj al ŝiaj gekunlaborintoj pro la senpeka aranĝo de tiu memorinda tago.

<u>MARSEILLE</u> - Ek de la komenco de la lerneja jaro, la kunvenoj de la grupo okazis ĉiulunde de la 18a kaj duono ĝis la 20a. 12 ĝis 20 gesamideanoj frekventis ilin regule.

Sinjoro CADENEL prezentis tre belan prelegon memore al RASPAIL Provenca kuracisto, scienculo kaj ... persekutita politika viro.

Du publikaj kursoj denove funkcias, organizitaj en du lernejoj kaj gvidataj de Sinjorinoj FRACCIOLI kaj VILLANOVA

F. GARRIGUE.

## <u>NICE °°° I N V I T O °°° NICE</u>

<u>GENERAL KUNVENO</u> - Ni kore invitas vin ĉeesti la jaran Generalan Kunvenon de la Esperanto-Grupo de NICE, kiu okazos la 10an de Decembro, je la 10a horo en Hôtel Scribe, 20 Av. G. Clemenceau

<u>BANKEDO</u> - kiu sekvos la kunvenon, okazos en Restoracio "BOSIO-AUGUSTE" Avenue Sainte Marguerite - NICE (Autobus directs, gare des Autobus)

"<u>menuo</u>" : Krudaĵoj - Ravioloj de l'kuirestro - Safida femuraĵo - Mikslegomaĵo - Fromaĝoj - Korbeto da fruktoj. Prezo : 16 frs. (Vino kaj Servicio enkalkulitaj)

<u>Ciu esperantisto el kie ajn estas kore invitita ! DANKON.</u> (Sendu <u>senprokraste</u> por la bankedo, vian aliĝon al Fino Marie-Louise COMINO, 2 rue Pierre Pietri, NICE.

TOULON - La 18a an de oktobro, Sro JULLIEN, Prezidanto de nia Federacio prelegis en la Liceo antaŭ 20 lernantoj, kiuj ŝajnis interesiĝi. Nia samideano, la saman tagon, faris paroladon publike, bedaŭrinde antaŭ tre malmutaj personoj kaj ne junaj. Fine li ankaŭ klopodis ĉe la estro de la nun organizata kultura Junuldomo, kiu jam havis okazon kontaktiĝi kun Esperanto, kaj promesis havi poresperantan agadon.

Fine bona rezultato : du kursoj malfermiĝos.

Cetere Samideanino C. JURQUET faras tre trafan propagandon varbante al niaj perkorespondaj kursoj novajn adeptojn, kiuj ne povas sekvi la publikajn kursojn.

## HONORDISTINGO

Niajn plej varmajn gratulojn al nia.tiom sindonema Samideanino Paulette LAMBERT, Professeur au Conservatoire de CANNES (ex-répetitrice de G.C. GRAVEN ) kiu ricevis de la Konservatorio la "2° Prix de violon" kaj la "Médaille de Solfège". Ciuj niaj amikoj ĝojos pri tiu distingo.

## TRIA KONGRESO DE STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO

### AIX EN PROVENCE - Francujo - 16 - 23 aŭgusto 1968

Krom la kutimaj kongresaj programeroj (inaŭguro, komitatkunsidoj, distraj vesperoj, balo, ktp...) okazos prelegoj rilate Provencon kaj ties kulturo, fakaj kunsidoj laŭ la studobjektoj de la partoprenontoj kaj forumo kun loka studentaro. Ni menciu ankaŭ viziton de la histoririĉa urbo, promenadon al montaro Sainte-Victoire (tiom ofte pentrita de Cézanne) kaj tuttagan ekskurson al romanaj postrestaĵoj kaj al la Mediteranea marbordo.

Studentoj, rapide aliĝu, vi ĝus specialan prezon ĝis la 31a de decembro : nur 120 frs (345 steloj) por membroj de STELC ; por ne-membroj : 130 aŭ 375 steloj)
PĉK : Cercle des Etudiants espérantistes 4 721 42 MARSEILLE.

Informojn pli detalajn vi povos ricevi de Studenta Esperantista Rondo, 28 rue Portalis, F-13 Aix-en-Provence.

G. NOURMONT Prezidantino
de Studenta esperantista rondo de Aix-MarseilLe

-:-:-:-:-:-:-

K A J . . . . N I ? La ministero de Publika Instruado de la Israela Respubliko ĵus publikigis, en hebrea lingvo, lernlibron de Esperanto. La Inĝenieron Sro SAVIR komisiis la Ministerio ties redakton.

-------

### Impresoj pri la Universala Kongreso de ROTTERDAM

"Unu el la plej ĉarmaj kaj bone organizitaj en la lastaj jaroj", laŭ eldiro de la eminenta kaj ne lacigebla prezidanto de U.E.A. Prof. LAPENNA. La Kongreso ja ne briis per impona nombro de ĉeestantoj, sed la kvalito estis despli sentebla kaj videbla. Kvalito de ĉio : de la parolaj prezentado, teatraĵoj, kantoj ktp. Nekutima alta nombro de diplomatoj ĉeestis la Kongreson. El la aliaj gastoj la israelanoj estis relative forte reprezentitaj kaj el la malproksima Japanujo venis dekkvin kongresanoj, inter kiuj la novelektita "Miss Esperanto".

Ni ne pretendas priskribi ĉion detale, tion multe pli bone faras la gazetoj, unuavice de UEA. Ceestis du anoj de la Nica grupo : Sroj KREIBIG kaj PAZZINI kaj unu anino el AVIGNON : Sino HUMM. Ili apenaŭ havis tempon por miri kaj admiri, ĉar oni serioze laboris en la diversaj kunsidoj : 1265 enskribiĝis por la Kongreso.

Se la Kongreso sukcesis morale (se ne finance), tion oni dankas unue al la estraranoj de UEA kuraĝe akceptis la gravan ŝanĝon de la kongresurbo (Rotterdam anstataŭ Tel-Aviv) plue al la urbestraro de Rotterdam, kiu subtenis finance kaj materiale la tutan aferon, al la aro de libervolaj helpantoj venintaj el la tuta lando kaj fine al la aktoroj kiuj, kun simplaj rimedoj, atingis grandajn efikojn.

Konklude, se oni demandus al mi, kio pleje interesis min dum la Kongreso mem, mi respondus : la impona koncertejo "De Doelen" en kiu disvolviĝis la kongreso, dum kiu mi pleje aprezis : a) la personecon elstaran de la Prezidanto de UEA, Prof. LAPENNA, - b) la ĉarmegan voĉon de Ramona Van Dalsem (la feliĉo, - c) la kongresan balon.

En la ferma kunsido, "La ĉielo ploris" kaj ni aŭskultis la simplan sed kortuŝan alvokon de Prof. SANCHO-IZQUIERDO invitinte nin al la 53a en Madrid. "ĝis revido, geamikoj".- KREIBIG.

-=-=-=-=-=-=-

## LIBREJA SERVO

| | |
|---|---|
| HAMLETO deShakespeare (mirinde bela traduko) .............. | 14 frs |
| LINGVAJ RESPONDOJ , de Zamenhof, broché ................. | 8,20 |
| FUNDAMENTO de ESPERANTO de Zamenhof, broché .......... | 13,70 |
| FUNDAMENTO de ESPERANTO, de Zamenhof, relié toile ...... | 18,20 |
| LINGVAJ RESPONDOJ, de Zamenhof, relié toile ................ | 11,00 |
| SEN ELIRO kaj LA RESPEKTEMA P., de Paul Sartre .......... | 8,60 |
| LA KUNPRINCLANDO ANDORO, LASTA FEUDA STATO ........ | 8,10 |
| GVIDLIBRO TRA PARIZO, par Julieta 250 pages riĉe ilustita .... | 13;00 |
| SERIO DE 10 ILLUSTRITAJ LIBROJ (tre interesaj, por komencantoj) | 10.00 |
| L'ESPERANTO VIVANT par Pierre Delaire, riĉe ilustrita, kompleta | 22,00 |
| LA ETA PRINCO (Le Petit Prince) de St Exupery, traduk de Delaire | 16,00 |
| LE DOCTEUR ESPERANTO (Vie du Dr. Zamenhof) ed. de luxe relié | 14,10 |
| FABELOJ, de Andersen, tr. Zamenhof. Ilustrita, vol. IV ......... | 15,00 |
| FABELOJ, de Andersen, tr. Zamenhof ilustrita, vol. Ia, 238 p. | 15,00 |
| L'ESPERANTO, FIL D'ARIANE de P. Delaire, ilustrita ........ | 15,00 |
| LUDOVIKO EN NEDERLANDO sam.a%toro. Cours supérieur Bela volumo | 17,00 |
| L'EDELVEJSO KAJ LA TRI VAGABONDINOJ, suivi de Citations Littéraires | 4,25 |
| Excellent DICTIONNAIRE FRANCAIS-ESPERANTO par Léger et Albaut, Membre de l'Académie, 736 pages, relié toile, sur papier semi-bible ............................................... | 21,60 |

(paiement par chèque postal à H. FEREZ N° 632 15 Centre de TOULOUSE.

-:-:-:-:-:-:-